2-a Jaro - N° 7 — Februaro-Marto 1947 BULLETIN INTÉRIEUR Prezo : 6 fr. frankoj

Laboristoj militas
Kapitalistoj profitas

# SENŜTATANO

Monata Informilo de la
PROVIZORA KOMITATO DE LA JUNUL-ANARKISTA INTERNACIO

La patriotismo, ĉu orienta, ĉu okcidenta estas ĉiam sama : veneno malbonigänta la homan pensadon.

REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO :
E. VIVANCOS
1, rue Fontaine-au-Roi, PARIS (11e) - Francio

KASISTO :
Albert GRILLAT, 24, rue Grange-aux-Belles, Paris-10e (Francio)
Poŝtĉekkonto . . . . . . . . . . . . . . . . C. C. P. 2.082-31 Paris

JARABONO (10 NUMEROJ) :
Francìando. . . . . . . . . . . . . . . . 60 fr. frankoj
Aliaj landoj : 70 fr. frankoj aŭ 7 respondkuponoj

## Hispanaj reflektoj kontraŭ absolutisma krimo

*Kroniko de nia korespondanto en Barcelono* ARMANDO LACUNZA

NE estas la hispanaj politikestroj ekzilitaj la vivigantoj de la kontraŭ-faŝista sintenada hispana popolo. Dum tiuj sin mordas unu la aliajn, kiel malsategaj hundoj. por la konkero de la ŝtato, la homoj de la CNT (Nacia Konfederacio de Laboro), FAI (Ibera Anarkista Federacio) kaj FIJL (Ibera Junul-Liberecana Federacio kuraĝe kaj senĉese ŝanceligas la teroristan reĝimon de Franco. Kiel ĉiam, la plej aktivaj kaj sindonemaj batalantoj kontraŭ la frankistaj trupoj estas la anarkistaj junuloj. Fidinda pruvo estas la fakto, ke konstante junaj liberecanoj estas arestitaj kaj kruele torturitaj de kanajlaj policoj. Ke tiaj aĉaj reptiloj de la absolutisma krimo agadu tiel montras, ke la liberecana junularo estas en la avangardo de la hispana kontraŭfaŝista rezistado.

Jen fakto lasttempe okazinta. Je la komenco de la monato decembro estis arestitaj en Barcelono kelkaj membroj de la Regiona Komitato de la Liberecana Junularo de Katalunio, kune kun aliaj agemaj kamaradoj de la FIJL en Francio, kiuj kaŝe transpasis la landlimon por partopreni la konstrueman kaj revolucieman agadon de la enlanda movado. Samtempe ankaŭ estis arestitaj aliaj batalantaj junuloj. La sekreta presejo, kie oni presigis *Ruta*-n (Vojo), informilo de la junul-liberecanoj, kiu aperis en la kataluna ĉefurbo, estis trovita de la policanoj sub la ordonoj de la aĉulo politik-socia brigadestro. Tiu krimulo, hundo de la francismo, estas ofte ĝenata de la agado de anarkistoj, ĉefe de la junuloj kies ribelemo, dinamismo kaj kuraĝo estas rimarkindaj.

Tiu brigadestro estas la fama Quintela ; sia ĉefa helpanto, Eliseo Molis estas inda ekzemplo de aĉa perverseco. Quintela utiligas Moliso-n tre profite por ilia sadisma ago, ĉar tiu ĉi bone konas laboristajn kaj revoluciemajn mediojn. Sed por ĉiu aĉulo estos puno. Kaj la anarkistoj jam mortkondamnis tiajn kanajlajn fiulojn de la « naciist-sindikalista » paradizo.

Persekutoj, malliberigoj, torturoj kaj mortigoj neniel malpligrandigos la firman decidon de agema idealista junularo de la FIJL. Tiuj junuloj plene konsciaj de la justeco de siaj idealoj konservas fortan fidon kapablan movigi montojn. Sed kiel oni diras : « Ne nur per pano sin nutras homo » ; tiel ne sufiĉas praveco kaj entuziasmo. Ni bezonas armilojn.

Do estas nepre necese funde montri al tutmondaj revoluciemaj junularoj, al internacia proletaro kaj al liberamaj kaj bonvolemaj homoj, ke dum la solidareco al hispana popolo restu en platonisma neagemo, la ebleco malaperigi faŝismon en Hispanio kaj Portugalio estos malproksima. ¿ Ne nur ĝi ne malaperos, sed ĝi plifortiĝos kaj denove pereigos homojn en la plej kruela amasmortigo. Jam ni parolis tiel dum la hispana milito kaj neniu aŭskultis nin. Sed interpretante la revolucieman sencon de nia AIT (Internacia Asocio de Laboristoj) ni havas la devon kaj rajtas ripeti la saman aserton por bori la orelojn kaj konsciencojn de ĉiuj.

Kiaj estas la plej efikaj helpaj peroj ? Ni, anarkistoj, opinias, ke oni devas energie protesti, ege propagandi kaj agi pere bojkoto kaj sabotago kontraŭ ĉio venante el faŝismo aŭ irante al ĝi. Samtempe urĝas financa solidareco por la batalantoj, kiuj en Hispanio kuraĝe luktas kontraŭ la despotismo.

Kelkaj diras cinike, ke la hispana problemo devas esti solvita nur de la hispanoj mem. Kaj tiel okazas. Financaj kaj politikaj interesoj postulas, ke Franco kaj Falange (faŝista partio) regu Hispanion. La ONU, kiu estas la esprimo de tiuj financaj kaj politikaj interesoj, neniel povas renversi la absolutisman ŝtaton en la hispana lando. Anglio kaj Usono timas perdi siajn ekonomiajn fontojn kaj diplomatan hegemonion en la duoninsulo. Rusio kaj siaj satelitoj ludas veran komedion ; ĉar definitive la celo de Rusio en la hispana tragedio estas utiligi ĝin por siaj imperialismaj ambicioj.

Ni, kiuj jam ne kredas infanemajn solvojn, instigas la revolucieman agadon, kiel sola procedo por neniigi la absolutisman krimon de abomeninda Franco.

Solidareco, tutmondaj laboristoj !... Solidareco, ĉiulandaj laboristoj ! Socia solidareco !


*Anarkista batalanto dum la revolucia periodo (1936-39) en Hispanio*

## LANTI MORTIS

Unu el la pioniroj de laborista movado malaperis, Eŭgeno Adam (Lanti), la 17-an de januaro, en Meksiko.

La malapero de tiu batalema homo, Esperantisto ĝis la medolo — kiel li mem diris — estas bedaŭrinda perdo por la laborista movado, ĉefe por SAT, kies fondinto kaj iniciinto estis Lanti.

Jam kelkaj biografiis pri li, aliaj pli spertaj ol mi rakontos la imitindan vivon de nia malaperinta amiko. Mi limigos mian skribaĵon por honorigi la idealulon. Ĉiuj konas Lanti-n kiel kapablan Esperantiston kaj konvinkitan sennaciiston, sed li, siamaniere. ankaŭ estis anarkisto depost sia junulaĝo, De 1898 (kiam li estis 19-jara) ĝis 1915, Lanti partoprenis la anarkistan movadon en Francio, sed en tiu jaro li ekdubis pri la kongrueco de anarkismo je la konstato, ke Kropotkin rekomendis partopreni la militon por venki la germanan militarismon kaj tiel liberigi la vojon por revolucio. (Ĉiuj ni scias, ke poste Kropotkin mem konstatis sian eraron). Depost tiam, Lanti ne plu partoprenis aktive anarkistan movadon, sed li asertis ofte, ke la anarkismo daŭre restis por li idealo.

De antaŭ nelonge, letere mi petis de li klarigon pri anarkismo laŭ lia vidpunkto. Jen kion li respondis en letero datita la 15-an de oktobro 1946 :

« Facile mi komprenas vian mironpri la kialo de mia ekdubo pri la anarkismo, tial ke mi ne sufiĉe klarigis mian penson pri la afero. Mi do nun konfesu al vi, ke ĝis 1915 mi fakte estis anarkista kredulo. Kiel simpla ulo, mi akceptis senkritike la ideojn de Eliseo Reclus, de Kropotkin kaj aliaj eminentuloj, tial ke mi diris al mi : « Tiuj homoj estas pli kleraj ol vi kaj sekve ili pli bone ol vi konas la veron ». Sed la sinteno de Kropotkin ekdubigis min kaj tiam mi diris al mi : « Vi pensu per via propra cerbo, kaj se vi eraros, nu, estos viaj kaj ne alies eraroj »...

« Sed mi tre bedaŭras la tempon, kiam mi estis kredulo kaj esperis, kiel Johano Grao en " La Société mourante et l'Anarchie ", ke mi vidos la morton de la kapitalista socio. Kredo estas forto, ke ĉe la plimulto da homoj ĝi ludas la rolon de spirita lambastono. Estas tro peza tasko pripensi ĉion kaj celi akiri propran opinion. »

Kaj li aldonas : « Senŝtata socio restas por mi idealo kaj mi simpatias al anarkistoj ».

Tuj post la apero de la unua numero de " Senŝtatano ", Lanti skribis al ni kuraĝigante nin por la daŭrigo de nia tutmonda bulteno. Esperantaj kaj liberecanaj aferoj interesis lin ; ambaŭ kunigitaj entuziasmigis lin.

La homaro perdis homon ; la Esperantistaro eminentan Esperantiston; SAT perdis sian fondinton kaj plej aktivan iniciaton ; la anarkistoj perdis amikon. Sed lia verko ne perdiĝis.

Lanti mortis, lia idealo vivas.

E. VIVANKOS

## NIA KONSTANTA CELO

La nuna tempo kaosa kaj konfuza necesigas efikan semadon de niaj anarkistaj konceptoj kaj postulas urĝan internacian gravan agadon. La junulaj aroj, kiuj eliris el la ĵus pasinta katastrofo, morale kaj korpe lacaj, serĉas novan vivfonton netrovitan en la burĝa kaj « demokrata » komedio. Grandega ondo da sendiferenco plenigas ĉiujn mediojn, kaj multaj senidealaj junuloj vivas frivolece. Antaŭ tiu malkuraĝema panoramo, la anarkista junularo devas levigi sian luktoflagon kaj ĝin vidigi sur la tuta mondo, altirante entuziasman aliĝon de tutmondaj junularoj.

Jen nia celo : aktiva kaj konstanta komprenigo de nia idealo al la homoj. Neniu anarkista junulo devas forgesi tian gravan taskon konvinkigi per parolo kaj agado la mondan laboristaron. La urbaj kaj kamparaj junuloj vidu en la anarkista junularo la garantion de ilia kompleta kaj definitiva liberiĝo. Kaj tiu fido estos la frukto de konstanta kaj senlaca laboro. Nia voĉo, la voĉo de la junaj anarkistoj devas esti aŭdata en ĉiu socia revolucia agado. La ekzemplo estas tre taŭga konvinkilo. Ni donu pruvon de revoluciema firmeco kaj konvinko en nia idealo per nia propra konduto kaj agado, kaj la tutmonda junularo venos kun ni.

Ja la politikuloj fiaskas ĉie. La gvidantoj de junulaj aroj aliĝitaj en politikaj partioj aŭ en la galimatia Monda Federacio de la Demokrata Junularo restos solaj antaŭ konstanta agado de ilia organizaĵo. Sed vi devas nepre agadi en fabrikejoj, kulturkampoj kaj universitatoj. Ĉiu vere liberecana junulo devas partopreni en tiu grandioza tasko. Jen la momento de nia agado, ĉar neniam la homaro bezonis tiom da justeco kaj da libereco, kiel nun. Ni troviĝas en danĝera vojkruciĝo. Se okazas nova devojiĝo, la estonto de la popolo povus eniri en novan kaj longan sklavecon.

Nia konstanta celo estas vekigi la liberecanan konsciencon de la popolo. Montri al laboristaj kaj studentaj junuloj, ĉefa kaj dinamisma faktoro de la socio, niajn anarkistajn solvojn. Ĉiu klopodo devas esti direktita je tiu celo. Kaj por ke nia tasko estu granda, efika kaj fruktodona, necesas, ke ni aldonu al nia agado vere universalan sencon. Por la certeco de nia sukceso, ni plifortigu nian Junul-Anarkistan Internacion, por ke ĝi estu forta organizaĵo kaj povu kunigi la iniciativojn de niaj junularoj, konatigante ilin spite la naciaj landlimoj, bariloj por frata manpremo de ĉiuj popoloj.

*Provizora Komitato de la JAI*

## KOMUNIKO

***Nova adreso de la Provizora Komitato de la Junul-Anarkista Internacio.***

*Korespondadon, gazetaron, informojn kaj monsendojn por la P.K. de la Junul-Anarkista Internacio devas esti sendataj al jena adreso :*

***Julio PATAN***
***25, Place Marengo***
***TOULOUSE (H. G.) — Francio***

*Ni petas, ke ĉiuj naciaj liberecanaj gazetoj publikigu nacilingve tiun komunikon.*

# ĜAZBANDO

*En religia broŝuro, mi legas: La personeco de ĉiu homo estas egalvalora al Dio. — Estas pro tio, ke ni ne konsentas genuiĝi antaŭ ĝi.*

*La respublikestro estas lukso, kiu mankis al ni kaj kies gravecon ni sentis. (El « Le Monde Illustré »). — Kiu diras, ke oni ne plu kapablas ridi en la lando de Rabelais!*

*En librejo: Mi ŝatus legi tre bonan kaj fidelan verkon pri Sovetio. — Do legu la vivon de la termitoj!*

*Iam en teatro, iu fama aktoro, kiu ludis la rolan de Joseph Prud'hom ekdiris: Tiu sabro estas la plej bela tago el mia vivo. — Preskaŭ ĉiuj ekridis. Mi ne; mi eĉ tremis, ĉar mi estis soldate vestita.*

*Estas terura pensi, ke kelkaj homoj pli ŝatas bestojn ol homojn! Kompreneble, ili povas karesi aŭ mortigi kiam plaĉas.*

*Iu rusa klerulo sukcesis trovi rimedon por dekobligi la tritikan rikolton. Ĉu li ne povus dekobligi la inteligentecon de la tutmonda registaro?*

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

### Senŝtatanoj helpas " Senŝtatano "-n

Romeral Manuel 40 fr., Bettembos 40 fr., Camille Benoy 50 fr.. Leandro Gómez 40 fr. Gines Martinez 40 fr., Julio Espinosa 40 fr. Chauvet Louis 40 fr., I. Migny 100 fr. H. Jonansson 166 fr., Esper. Anarkista Grupo de Stockholm 500 fr., Boris Keralt 100 fr, Berthe Cavanac 40 fr., B. Liano 80 fr., Marso 40 fl., Garcia 40 fr., Ciboule 40 fr., Dalman 40 fr., Jean Denis 40 fr. Manent 100 fr., Edilli Johansson 66 fr., TLES-Grupo de Göteborg 335 fr., Victor Halberg 66 fr., Pelas 40 fr.

Samideanoj, helpu nin! Sendu monhelpon por nia bulteno!

## ILUSTRITA POŜTKARTO
### "For la Milito"

Baldaŭ aperos ilustrita poŝtkarto eldonita de "Senŝtatano".

Per ĝi vi propagandos kontraŭ la milito kaj samtempe helpos finance nian bultenon.

La prezo estas 5 frankoj francaj po poŝtkarto, aŭ unu int. respondkupono po du poŝtkartoj.

Samideanoj! Sendu ilin ĉe via landa peranto aŭ al: Albert Grillat, 21, rue Grange-aux-Belles, Paris-10 (Francio).

# NIA MOVADO TRA LA MONDO

**Hispanio**

Dum la du lastaj monatoj, la frankista polico akre agadas kontraŭ la anarkistoj, ĉefe en Barcelono, kie estis arestita la sekretario de la PK de la Junul-Anarkista Internacio, kamarado Germinal Gracia, kune kun aliaj junuloj. La fipolicoj sovaĝe torturis ilin antaŭ ilia « oficiala » enkarcerigo.

La duoninsula komitato de la FIJL proklamis per cirkuleroj la deziron daŭrigi la lukton kontraŭ la frankisma tiraneco. Spite la persekutoj, niaj kamaradoj ne malkuraĝiĝas. Tutmondaj liberecanoj, helpu ilin!

**Bulgario**

Nova informo de bulgaraj kamaradoj, ricevita en la Sekretariejo de la AIT sciigas kiom teruraj estas la persekutoj kontraŭ la anarkistoj en Bulgario. La fakto posedi la bultenon de la Anarkista Federacio aŭ propagandajn librojn kaj broŝurojn sufiĉas por esti arestitaj kaj fie batitaj de la policoj de Dimitroff.

Urĝas, ke ĉie la konsciaj homoj energie protestu kontraŭ tiaj proceduroj.

**Portugalio**

Ni ricevis informojn rekte el Portugalio sciigante la agadojn de portugalaj liberecanaj junularoj. Niaj anarkistaj kamaradoj tre intense propagandas kontraŭ la reĝimo de Salazar; ili eldonas du bultenojn: « Juventudes Libertarias » (Liberecana Junularo) kaj « O Despertar » (La Vekiĝo). La unua estas organiza informilo kaj la dua tre valora propagandilo kaj luktogazeto kontraŭ la tiraneco.

La enlanda situacio estas vere malbona sub la faŝista diktatoreco. La malamikoj de la reĝimo estas persekutataj kaj ili devas agadi kaŝe. Malgraŭ ĉio, la regiona fako de la FIJL kaj la Generala Konfederacio de Laboro estas fortaj kaj bone konsiderataj de la popolo. La portugalaj liberecanoj rememorigas al ĉiuj, ke la lukto kontraŭ Salazar similas la lukton kontraŭ Franco, kaj ke la internacia agado kontraŭ la hispana diktatoro devas esti samtempe kontraŭ la portugala.

**Nordafriko**

La FIJL en Nordafriko plifortiĝas post la lasta kontinenta kongreso; ĉiusemajne, la liberecana gazeto « Solidaridad Obrera » publikigas junularan paĝon, redaktitan de niaj kamaradoj. Baldaŭ ili aperigos propagandan kaj infroman bultenon. En preskaŭ ĉiuj urboj ekzistas junulliberecanaj grupoj.

**Britio**

Ni jus ricevis la 1-an numeron de « Inquiétudes Junvéniles », informilo de la FIJL en Britio; tre plezure ni konstatas vekiĝon de la junulara movado. Niaj kamaradoj pretigis konferencserion inaŭguritan de nia lerta kamarado J. Gracia Pradas. Ankaŭ ili organizis sukcese libroservon.

**Svedio**

Al Goteborg-a haveno alvenis ŝipo el Hispanio, enhavante oranĝojn. Du junaj kamaradoj, 26-jaraĝa artisto kaj ĵurnalisto el Stockholm kaj 35-jaraĝa ŝipkonstrua laboristo el Goteborg, jetis petroleon sur granda parto de la oranĝoj, kiuj estis tute detruitaj.

Antaŭ la policistoj, niaj kamaradoj diris, ke ili faris la sabotagadon tial, ke ili estas anarkistoj kaj havas grandaniman simpation por la anarkistoj hispanaj kaj ilia batalo kontraŭ Franco.

La agadoj okazis la 12-an de decembro. Hodiaŭ la taggazetoj anoncas ke niaj kamaradoj estis liberigitaj de la polico.

**Polio**

Ni ricevis novajojn de niaj polaj samideanoj, sciigante pri la sorto de liberecanaj poloj kaj siaj unuaj agadoj. Jen kelkaj paragrafoj de la letero de nia korespondanto:

« Kiam eksplodis milito, ni tuj partoprenis subteran movadon kontraŭ germana faŝismo. Ni havis kaŝitan presejon. Niaj kamaradoj tre heroe batalis. Defendo de nia presejo ĉe strato Francuska en Varsovio venos al historio de revoluciaj agoj. Multaj, tre multaj el niaj bravaj kamaradoj mortfalis en tiu sangavida jarcento. Pro diversaj kaŭzoj nun ne ekzistas liberecana movado. Ni fondis eldonkooperativon kaj eldonas librojn. Ni jam eldonis « Reciproka Helpo kiel faktoro de Disvolvigo »-n, de Kropotkin. Antaŭ milito preskaŭ ne ekzistis liberecana literaturo en pola lingvo. Nun profitante la okazon, ni volas plenigi tian mankon. Mankas al ni tamen materialoj. Ni bezonas liberecanajn klasikajn verkojn en ĉiuj lingvoj por ilin traduki kaj eldoni pole. »

Nia korespondanto petas la tutmondajn liberecanojn, kiuj povus sendi tradukindajn liberecanajn librojn, interesante tutmondan legantaron, sendu ilin al jena adreso: Stefan Rostonice, Fraugula 2 (Piotrkowska 70) m2, Ipietrow podworu, Lodz (Polio).

*NOTO DE LA REDAKCIO. — Ni petas niajn korespondantojn, sendu informojn pri socia kaj junulara movadoj por esti publikataj en la rubriko Nia movado tra la mondo.*

# Esperantaj Kongresoj

## 20-a Kongreso de S.A.T.

Ni ĝojas pri la novajo ke niaj amikoj en la laborista movado, S.A.T., aranĝos kongreson en Aarhus (Danio) je la 2-7 Aŭgusto 1947. Ni deziras al ili fruktodonajn rezultojn por nia laborista Movado.

Petu informojn al viaj landaj S.A.T. perantoj.

## 2-a Kongreso de Francia S.A.T.-Amikaro

Dum Paskaj feriotagoj okazos en Lyon la 2-a kongreso de S.A.T.-Amikaro.

Por peti sciigojn kaj aliĝi skribu la sekretario de la Kongres-Komitato: Kamarado Jules Perret, 68, rue Renée, Villeurbanne (Rhône), aŭ al Groupe Espérantiste Ouvrier, Bourse du Travail, place Guichard, Lyon-8.

## Kongreso de la Neŭtrala Movado

Ni ricevis komunikon de la Kongres-komitato de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Bern (Svisio), de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1947.

Petu informojn al Loka Kongresa Komitato, Bern, Bundergasse 20 (Svisio).

Imprimerie J. Polgar
33, Rue Lacépède, Paris-5e

## LA GRANDAJ PENSULOJ

# Robert REITZEL

Kiu konas lin, la german-usonan libereco-poeton Robert Reitzel? Nemultaj germanaj viroj kaj virinoj konas lin. Eĉ konataj verkistoj konas nek lian nomon, nek lian verkaron. La rondo de Reitzel-adorantoj de la pasinta jarcento limiĝis je nur malmultaj liberecamaj verkistoj kaj poetoj, kaj je la liberecema laboristaro socialisma, batalante pro siaj sociaj kaj kulturaj postuloj tiutempe.

Robert Reitzel estas naskita la 27-an de januaro 1849 en Schofheim (Badenio). La patrino estis klera virino kaj rilatis multe kun badeniaj revoluciuloj. Ne mirige, ke la evoluo de Reitzel okazis samdirekte. La patro, severa instruisto, na estis kapabla akiri al si la amon de sia filo. Reitzel vizitis unue la lernejon de sia patro; poste la gimnaziojn de Karlsruhe, Mannheim kaj Konstanz; fine — ĉar li devus fariĝi pastro — la universitaton de Heidelberg. Reitzel ne emis studadi la teologion, pli multe allogis lin la filozofio kaj la literaturo. Ne farante la ekzamenon, li elmigradis en jaro 1871 al Nord-Usono.

Alveninte Usonon soleca kaj senrimeda, li suferis unue grandan mizeron. Reitzel laboris kiel domestiko, kelnero kaj tabak-laboristo kaj fine, farinte preĝistan ekzamenon en la evangelie-reformita sinodo de Washington, li deĵoris ĉi tie kiel preĝisto. Baldaŭ li malpaciĝis kun la konsistorio. La eklezia paroĥo solidariĝis kun Reitzel kaj ĝi fondis la liberan paroĥon de Washington. Nun oni aranĝis gravajn ampleksajn parolad-vojaĝojn, konigante lian nomon en multnombraj urboj.

Reitzel estis eminenta oratoro, kiu sciis entuziasmigi la aŭskultantaron per siaj geniaj belsonantaj kaj elokventaj paroladoj. Baldaŭ li estis tre konata kaj ŝatata de la germana loĝantaro.

Li amikiĝis kun Karl Heinzen kaj aliaj radikalaj individuoj, studadis la socialismajn doktrinojn kaj emis ĉiam pli al radikalaj ideoj. En la jaro 1876 li parolis en Detroit; ĉi tie li havis multajn amikojn en la gimnasaika societo; ĉi tiu aranĝis ankoraŭfoje ĉiklon da paroladoj en la jaroj 1882-83, pritraktante religiajn, filozofiajn kaj literaturajn temojn. Fininte rondiran vojaĝon en la okcidentaj ŝtatoj kaj vizitinte multnombrajn gimnastikajn kaj liberpensulajn societojn, li nun fine transloĝadis al Detroit, konsiderante la konsilon de siaj amikoj. Liaj amikoj havigis al li la monrimedojn por la eldonado de semajne aperanta gazeto, kaj en oktobro de l' jaro 1884 aperis la unua numero: « La Malriĉa Diablo ».

Pere de « Malriĉa Diablo » estiĝis interligilo inter la multnombraj progresemaj kaj liberalaj viroj kaj virinoj.

En sia nekutima leterkesto, li interrilatis individue kun la legantaro. Ĝi estis kvazaŭ granda familio kaj li la ĉefo, la kapo, la animo de tiu ĉi libera komunumo. Senlace li prikantis, glorigis la vivon, la belecon kaj amon: sed li sciis ankaŭ paroli sarasme, moke kaj malame, se la situacio devigis al tio. Kuraĝe kaj plenforte li kontraŭbatalis la malbonecon, la banalecon kaj malnoblecon; senhezite kaj ne longe taksante li atakis la kontraŭulon. Kiam la reakcio kaj la tiranoj furiozis terure kaj la situacio estis plej danĝera, tiam la koro de Robert Reitzel tremis pro kolero, ribelemo kaj indigno, tiam la arde kortuŝe verkitaj artikoloj de « Malriĉa Diablo » eniris la publikecon, ĉie kaŭzante kaj venkante la samajn sentojn.

Kiam en la jaro 1887, post la fatala okazintajo sur la fojno-foriro en Chicago, la burĝaro, la reakcio de USA postulis sangan venĝon ankoraŭ ne kontentigita per la ekzekutado de Spies, Parson, Lingg, Fischer kaj Engel; kiam la radikala-socialisma movado de Nord-Usono troviĝis en plej serioza danĝero, kiam korupta gazetaro instigis la registaron al teruraj abomenajoj, tiam la voĉo de Robert Reitzel eksonis pli kuraĝe, kiel iam antaŭe. Kaj ĉe la tomboj de l' pendigitoj li prezentis emfazan funebran paroladon, amasigante koleron, indignon kaj obskuran minacon en patose protesta maniero. Ĝis fine de la terura akto, li estis laborinta, organizinta pri la liberigo de la kondamnitoj. Kaj kiam lastmomente ĉi tio ne sukcesis, li proksimis malesperis.

Robert Reitzel estis ĝismorte aktivulo. Sendependa ĉiuflanke, li delikate prikantis la liberecon kaj belecon. La « Malriĉa Diablo » unuiĝis kiel amikojn la reprezentantojn de plej diferencaj politikaj kaj sociaj tendencoj. Inter ili estis demokratoj, kiel Heinzen kaj Michael Georg Konrad, la liberpensuloj Ruedebush kaj Bruno Wille, la socialdemokratoj Karl Henckel kaj Robert Seidel, la komunisto John Most, la individualistoj Tucker, Schlum kaj Mackay, plue, Hans Jakob, katolika pastro. Viroj, virinoj de ĉiuj rangoj, klasoj knj kastoj adoris kaj honoris lin sammaniere. Li ne konsideris parti-etiketojn. Post la atenco de Angiolillos, li sin konfesis kuraĝe kaj fiere kiel anarkisto.

En jaro 1893, li malsaniĝis kaj baldaŭ oni povis diagnozi teruran malsanon; ĝi estis atrofio. Senhalte malpliboniĝis lia sanstato kaj en jaro 1894 okazis paralizo de l' subaj ekstremitajoj-organoj (hemiplegio). Li mortis la 30-an de marto 1898.

Li suferis la saman sorton, kiel la di la treege ŝatata Heinrich Heine; li estis katenita je la matracotombo. El de la matracotombo, li redaktis ankoraŭ tri jarojn la gazeton, ĉiam batalema kaj plena de vivoĝojo. Kaj la malsanada heroo tenis en siaj manoj la spiritan glavon de rozoj ĉirkaŭvolvitaj malgraŭ ĉiuj suferoj. Ĝismorte li havis nedaŭreblan humoron kaj li eldevigis de la vivo en ĉi tiu por li dolorplena tempo orsunajn horojn.

La morto lin liberigis de liaj, kun braveco toleritaj suferoj. La 2-an de aprilo 1898, lia korpo estis encindrigita en la krematorio de Detroit.

Robert Reitzel estis revoluciulo de tuta koro, de tuta animo, de tuta sentimento. Kiel li sciis ataki! Nenin povis tiel entuziasmigi la korojn, kiel li, elvoki al kolero kaj furoro kontraŭ tiranoj, se ili furiozadis plej terure. Ĉiam kaj ĉie li flame defendis la venĝinton de la ofendita homaro, se iu ajn viro de l' popolo senleĝe mortpunis hom-ĉikanulon-fihomon.

La prozaj verkoj de Reitzel estas de klasika beleco, de arda malamo, de kora amo kaj de ora humoro; venonta generacio certe honoros lin kiel germanan klasikulon.

Jen kelkaj titoloj el liaj verkoj: Aventuro de Verdulo; Kiu mi estas? La unua Prediko; La unua Amo; La Amo al Infano; En malfrua Somero krakis la unua pafo; En Vinkelero; Paskaj Memoroj, kaj multaj aliaj.

**MARTELŜTONO**

KUL